

## Saluton, SESanoj!

Printempo venis. Mi ĉiam imagas pejzaĝon de neĝkovrita montaro Hyakumacuzawa en la okcidenta blua ĉielo, kiam mi sentas printempan aeron. Mi ofte vagis skiante en ĉirkaŭa loko de la okcidenta montaro en aprilo kaj majo. Ni ne vizitis tien en alia sezono, ĉar tie estis kovrita de densa sasaaro en somero kaj de profunda neĝo en vintro. Tiu loko estis nia plej agrabla ludejo en printempo. Mia forpasinta amiko M loĝis en la piedo de la monto. Kiam li havis domon, nenia meblo troviĝis hejme, ĉar lia tuta mono estis elĉerpita. Liaj familianoj prenis siajn manĝaĵojn aparte ĉe siaj plaĉaj lokoj en ĉambro, iuj uzante karton-skatolon anstataŭa tablo, aliaj sur planko. Li estis eksterordinara instruisto de super mezlernejo. Kiam li edziĝis, li regalis siajn tut-lernatojn (eble kelke da centoj) per rosto-festo en la tute luita restoracio de Sapporo biero-fabriko. Estro de lia lernejo parolis, ke M estas tre bona instruisto sed mi esperas ke li fariĝu pli ordinare. Li ĉiam instruis nur siajn favorajn objektojn lasinte problemojn de ekzameno por studentiĝi en universtato. La nupto estis riportata en gazeto kiel rara afero. Mi promenis en parko rememorante lin. Kiam mi rimarkis ke mi estis en parko, mi ne povis rememori, kiel mi paŝis tie. Mi eble iam rimarkos, ke mi trovos min mem ie kaj mi ne povos reiri hejmen. Mi lernis, kiel mi estos kadukita. (H.S.)

# 花の季節になりましたが、ウィールスの感染は止まりません。ワクチン接種がある程度済むまで集会は待たないといけない様です。もう少しの辛抱となりますように。